APPEL AUX DIPLOMATES

En 1915, le **Dr L.L. Zamenhof** publia une longue lettre ouverte destinée aux diplomates. Elle fut publiée dans plusieurs revues (notamment anglaise, suisse et hongroise) en novembre-décembre 1915.

En voici quelques courts extraits :

« …Quand après la fin de la guerre se réuniront les diplomates, ils pourront opérer des changements sur la carte de l'Europe. Mais…leur tâche principale doit être de mettre en place au nom et sous la garantie de leurs gouvernements les lois suivantes :

1° Chaque pays appartient moralement et matériellement à tous ses habitants naturels ou naturalisés, quelle que soit leur langue, leur religion ou leur origine supposée ; aucun peuple, dans aucun pays, ne doit avoir de droits ou devoirs supérieurs ou inférieurs à ceux des autres peuples.

2° Chaque citoyen a pleinement le droit d'utiliser la langue de son choix et de pratiquer la religion de son choix.

3° Pour toutes les injustices commises dans un pays, le gouvernement de ce pays est responsable devant un Tribunal Permanent européen, mis en place avec l'accord de tous les pays européens.

4° Chaque pays et chaque province doivent porter, non pas le nom d'un peuple, mais un nom géographique neutre, librement accepté par tous.

Messieurs les diplomates ! Après l'effroyable guerre exterminatrice, qui a plongé l'humanité plus bas que les bêtes les plus sauvages, l'Europe attend de vous la paix. Elle n'attend pas qu'une pacification provisoire, mais une paix permanente, la seule qui soit digne d'une race humaine civilisée.

Mais… souvenez-vous que ***le seul moyen d'atteindre une telle paix est d'éliminer pour toujours la principale cause des guerres… , la domination de certains peuples sur d'autres peuples****. »*



42 (6) ✯ ESPERANTO ✯ № 4

POST LA GRANDA MILITO

ALVOKO AL LA DIPLOMATIO

LETERO DE DOKTORO L. L. ZAMENHOF

Tertura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomatoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas.

Kiam vi kunvenos post la plej eksterminanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ nova milito]. Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas ofertitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj bonstatoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta kaj ke post la fino de viaj laboroj la humaro povu diri: ni ne vane elportis la grandegajn kaj teruraĵn oferojn.

Ĉu vi komencos simple refaradi kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidos, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tian laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur *negrava parto* de viaj laboroj; gardu vin, ke la refarado de la karto ne fariĝu la tuta *esenco* de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj, kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro elportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per refarado de la karto, ĉar ĉiu faŭna justeco koncerne unu genton estos samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva: sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne *unu gento*, sed *ankaŭ aliaj gentoj*; kaj se vi decidos, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne solv ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La „liberigo", kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu terpeco mastro] super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj suferis kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero, ke tiu gento, kiun vi privilegios, entuziasme krios: „Vivu la diplomatoj!" kaj se tiu gento sur la koncerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke „la tuta loĝantaro de la terpeco A *sentas* sin tre feliĉa"... Sed tio estos mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio, ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis „fremduloj", ne venos al ĝiaj oreloj.

Transdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros malĝustajon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajtojn koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas: laŝte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantitan decidon de ĉiuj Eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon:

Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.

Tio estas, ke en sia privata vivo ĉiu civitano en ĉiu regno havas plenan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas; ke se en la institucioj publikaj estas uzata unu sola regna aŭ loka lingvo, tio estas nur pro-oportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne humiliga tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta. Ĉar la gentaj nomoj, kiujn portos ankoraŭ multaj regnoj kaj provincoj, estas la ĉefa kaŭzo, pro kio la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia supozata deveno, tiel ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de la gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian.

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj Eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn „Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo". Sed se nun estas ankoraŭ tro frue, por paroli por tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan maibonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.

Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj Eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉeta kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armiĝado, ĉar tiam oni jam neniam kaj neniie povos diri, ke „la patrujo estas en danĝero". Oni sclas ja tre bone, ke la vortoj „patrujo en danĝero" ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj jetu ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: „Minacas danĝero, ke sur la terpeco, kie ĝis nun *mia* gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli toleratoj, morgaŭ eble *alia* gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata."

Kiam en la tuta Eŭropo regos politika justeco *absoluta*, t. e. natura, ĉie kaj por ĉiuj egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj, kiam la landoj ne portos plu gentajn nomojn, kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron gentesŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentoj-mastroj kaj gentoj-servantoj — tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj, tiam ĉiu homo povos sidi tute trankvile en sia natura, sole vera kaj sincere amata patrujo, li ne bezonos plu timi, ke iu povas „forpreni" ĝin de li, kaj li ne bezonos revi pri forpreno de la patrujo de aliaj homoj.

Mi sclas tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos *subite*, en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomatoj faros. Sed por tiu poste laboros jam personoj *privataj*, per predikado, edukado, alkutimigado, ktp.; de vi, diplomatoj, ni atendas nur, ke vi donu al ni la *ekton* tion tiri. Reciproka malamo inter la diversaj gentoj de la homaro ne estas io natura, kiel ne estus natura la reciproka malamo inter la diversaj familioj de unu gento: la malamon kaŭzas nur — krom la facile forigebla reciproka nekomprenado kaj nekonado

№ 4 ✯ ESPERANTO ✯ (7) 43

— la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reageneco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefarebie interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.

Se vi eĉ farus menion atisn, *se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj* (afero tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tute natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra, ĉar la malfeliĉa nomo ne sole kvazaŭ pravigos la plej malnoblajn intergentajn maljustajojn en la diversgentaj landoj de la orienta Eŭropo, sed eĉ en landoj pli civilizitaj ĝi ĉiam konfuzos la kapojn eĉ de la plej honestaj civitanoj, subtenante en ili ĉiam la opinion kaj senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ ĉe la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povas alkutimiĝi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion. Ĉar por tia nacio simple ne ekzistas *vorto*, kaj, demandite pri tio, ai ktu popolo li apartenas, la loĝanto de tia lando pro manko de tiu vorto estas *devigata* nomi ian *gention*; kaj ĉi tiu devigata konstanta alkaŭkuiado sin al ia speciala gento anstataŭ al la komuna nacio de la lando forte subtenas la gentan ŝovinismon kaj malpacon inter la samlandanoj.

Resumante ĉion, kion mi diris, mi ripetas:

Kiam post la fino de la milito kunvenos la diplomatoj, ili povos fari ŝanĝojn en la karto de Eŭropo; sed tio ne devas esti ilia *ĉefa* laboro. Ilia ĉefa laboro devas esti: starigi en la nomo kaj sub la garantio de siaj registaroj pli-malpli la sekvantajn leĝojn:

1e Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; nenia gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj.

2e Ĉiu regnanu havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas. Nur en la institucioj publikaj, kiuj ne estas destinitaj speciale por unu gento, devas esti uzata tiu lingvo, kiu per komuna interkonsento de la regnanoj estas akceptita kiel lingvo regna. En tiuj publikaj institucioj, kiuj havas karakteron speciale lokan, anstataŭ la regna lingvo povas esti uzata alia lingvo, se ne malpli ol $^{2}/_{3}$ de la urbanoj donis por ĝi tian konsenton. Sed la lingvo regna aŭ urba devas esti rigardata ne kiel humiliga tributo, kian fuldas gentoj mastratoj al gento mastranta, sed nur kiel proprazvola poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto.

3e Pro ĉiuj maljustajoj, faratj en la regno, la registaro de tiu regno estas responda antaŭ Konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo, starigita per interkonsento de ĉiuj Eŭropaj regnoj.

4e Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de la gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj.

Sinjoroj, diplomatoj! Post la tertura eksterma milito, kiuj starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpacigon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon per ĉiam la *ĉefan kaŭzon* de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, *la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.*

✯ NOTOJ ✯

.·. **Rehejmigo de la civilkaptitoj.** — La svisa oficejo por la rehejmigo de la civilkaptitoj finis sian taskon. Tamen, ĝi restos ankoraŭ kelkan tempon malformita por ordigo de la aferoj kaj korespondado.

Restas ankoraŭ en Germanujo kelkaj miloj de francoj, kiuj estis forkondukitaj de la militista aŭtoritato en Germanujon. Tiuj personoj estos rehejmigataj ankaŭ tra Svisujo, sed per la svisa militista aŭtoritato. Tiu servo estas farita sekve de nova interkonsento kun la koncernaj ŝtatoj, kiuj repagos la transport- kaj nutrad-elspezojn.

La rehejmigo komencis en marto, kaj jam estis transportitaj kelkaj miloj, plejparte virinoj kaj infanoj tute malriĉaj. Ĝi fariĝas tra Schaffhausen kaj Ĝenève; dumvoje la rehejmigatoj estas gastigataj kaj nutrataj; ili ankaŭ ofte ricevas vestaĵojn kaj diversajn helpojn. Notinde estas, ke tiuj malfeliĉuloj rakontas siajn malĝojajn aventurojn en senpasia kaj digna maniero.

.·. **Por la unuflanka oficiroj.** — La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco komunikas la jenan noton:

„La interŝanĝado de la gravevunditoj plenumĝas kaj estas sur bona vojo. Pluraj vagonaroj jam pasis tra Ĝenevo, unuj al Germanujo, aliaj al Francujo. Sed la Komitato opinias, ke la entrepreno estas plivastigota.

„Multaj vunditaj oficiroj devos resti en la malamika lando kaj ne estos interŝanĝataj, ĉar oni timas, ke malgraŭ iliaj vundoj, ili povas ankoraŭ utili al sia lando, laborante en oficejoj kaj tiel liberigante sanajn oficirojn, kiuj tiukokaze povus iri al la batalilinio.

„En tiu okazo Svisujo povus denove plenumi utilan verkon kaj havigi al tiuj oficiroj la ebleĉon forlasi la hospitalon, akceptadi vizitojn, kaj eĉ kuraciĝi de iliaj proprai familioj kaj resaniĝi en tre favoraj sanitaraj cirkonstancoj. Tiuj oficiroj estos internigataj en Svisujo kaj loĝigataj en hoteloj, je prezoj fiksotaj kaj repagotaj de ilia lando. Ili donus sian honorvorton, ke ili ne eliros el Svisujo kaj eĉ el certa regiono antaŭ la fino de la milito. Kompreneble oni ne loĝigus ilin en la grandaj urboj, nek ĉe la landlimo, sed en valoj aŭ lokoj de centra Svisujo, kie ili trovus bonajn hotelojn kaj la necesan kuracistan helpon.

„La Internacia Komitato scias, ke la svisa registaro estas preta facitigi tian aranĝon, kiu sendube estos favore akceptata de la militantaj regnoj kaj estos konforma je la gastiĝemaj tradicioj de Svisujo."

Oficialaj klopodoj nun komenciĝis.

.·. **Poŝtmandatoj kun Hispanujo.** — De la 15 marto 1915 funkcias la servado de poŝtmandatoj (kiu ĝis nun ne ekzistis) inter Svisujo kaj Hispanujo, laŭ la bazoj de la internaciaj traktatoj en Romo. Oni povas sendi ordinarajn kaj telegrafajn mandatojn ĝis la sumo de 1000 frankoj. La enpaga kurzo estas fiksita je 1.04 franko por 1 peseta.

Al niaj abonantoj

Ĝis plibonigos la cirkonstancoj, nia gazeto regule aperos ĉiumonate.

La abonantoj, kiuj estos senpere informataj pri finigo de sia reabono, estas petataj kiel eble plej baldaŭ sendi al ni la sumon de 5 frankoj per poŝtmandato aŭ respondkuponoj.

Escepte, ni ankaŭ akceptos sesmonatajn abonojn po 2,50 frankoj.

La abonantoj loĝantaj en regionoj, kun kiuj la poŝtreliatoj nun estas interrompataj, ricevos la aperintajn numerojn tuj kiam estos eble.

La abonantoj, kiuj militservas aŭ estas militkaptitoj, kaj ne havus la ebion nun sendi sian reabonon, bonvolu nin informi.

Lettre de Zamenhof aux diplomates Revue Espéranto avril 1915 (Archives UEA)